

eksonimoj (= la nomo en fremda lingvo, ekz. angle *Venice* aŭ germane *Venedig*). Diskutataj estas ankaŭ la ŝanĝiĝo de nomoj, la lok-nomado en plurlingvaj regionoj, la nom-elparolo kaj la diversaj sistemoj de transigo de nomo el nelatinaj skriboj (ĉina, araba, rusa k.t.p.) en la latinan skribmanieron.

En Germanujo la nomskribado sekvas la rekomendojn de Konstanta Komisiono pri Geografiaj Nomoj (StAGN), komisiono el kartografoj, geografoj kaj lingvistoj. Internacie ekzistas la tendenco, en mapoj kaj atlasoj limigi la nombron da eksonimoj laŭ monda normigo. Tamen la eksonimoj, kiuj ja estas partoj de la lingva kulturheredaĵo, ne formortos. Ĉiama problemo restas la senriproĉa reproduktado de endonimoj el nelatinaj skriboj. Oni povas la nomon "transliterigi", t.e. transigi signon post signo en la latinan skribon, (ekz. la bulgaran vilaĝon *Dobrič*), aŭ ĝin "transskribi", t.e. oni konsideras la elparolon de la nacia lingvo (sekve, en la germana, *Dobritsch*). Tio plifaciligas al la leganto la ĝustan elparolon de la nomo, tamen tre malfaciligas ties remeton en la originalan lingvon.

Do, okupiĝo pri propraj nomoj en Esperantujo ne estas ridinda, sed ankoraŭ nesolvita problemo, kiu fakte bezonas atenton kaj Esperantan normigon, ne nacilingvan. (*National Geographic*, 9/2002, p. 12)

La prauloj de la moderna lingvistiko

Kion esploris ili? La hindaj pastroj de la antaŭkristana jarmilo sciis, ke ilia lingvo laŭ elparolo kaj gramatiko malsamas de la plej aĝaj religiaj prateksto, la *Veda*. Sed ŝanĝiĝo signifis por ili profanadoj. Pro tio ili evoluigis "sciencobranĉojn", interalie por lingvosono (fonetiko), deveno kaj baza signifo de la vortoj (etimologio), parol-ritmo (metodiko) kaj lingvokonstruo (gramatiko).

La hindaj eruditoj do sisteme esploris la rekonilojn kaj la karakterizaĵojn de la antikva pralingvo kaj povis pretigi validan tekston. La plej frua atesto de tiu enorma scienca povumo estas la "*Ashtadhyayi*" – konsistanta el 5 libroj – de la gramatikisto *Panini*, kiu vivis en la 6-a/5-a jarcenton. Tie estas interalie enkondukita la nocio de "voĉeco" kaj priskribita tiel tiklaj aferoj kiel la reciproka influo de najbaraj sonoj dum interliga parolado.

La moderna lingvistiko evidente "manĝetis" belajn pecetojn de la hindaj saĝuloj.

(2009-09-14)

Mielo kiel mortiganto de baciloj

Novzelanda mielo pli fidine efikas kontraŭ bakterioj ol antibiotikoj. Aŭstraliaj sciencistoj malkovris, ke eĉ la en malsanulejaj timataj multrezistaj "superbaciloj" pereas, kiam ili kontaktiĝas kun mielo el la floroj de la novzelanda *Manuka*-teoarbo. Laŭ la esplorista teamo de la mikrobiologo *Dee Carter* ĉe la Universitato de Sidnejo / Aŭstralio neniu bakterio povis evoluigi rezistecon kontraŭ la *Manuka*-mielo.

En la medicinklinika ĉiutagaĵo la ĝenerale uzataj antibiotikoj montriĝas pli kaj pli senefikaj, ĉar la mikroboj evoluigas en plej mallonga tempodaŭro certajn kontraŭrimedajn defendomeĥanismojn. En la *Manuka*-mielo, aliaflanke, iu sukermalkomponaĵo (laŭnome *Methylglyoxal*) forte kaŭzas streson al la bakterioj antaŭ ol ili povas evoluigi rezistecojn.

La preciza efikokomplekso ankoraŭ ne estas deĉifrita, sed la ekonoj plialtigas la aplikadon de medicina mielo kiel alternativon al antibiotikoj. Sub la merkata nomo "*Medihoney*" ĝin ofertas la novzelanda naturkuraca entrepreno "*Comovita*" kaj jam uzas ĝin la infan-kliniko de la universitato en *Bonn*, Germanujo. *Comovita* nun volas plivastigi sian produktaĵ-paletron per elmiela vundoĝelo kaj vundoplastro.

(*Wirtschaftswoche* 28/2009, p. 70)

Pesticidoj el manĝ-oleo

La brita plantprotektista specialistejo "*Plant Impact*" evoluigis pesticidon surbaze de vegetaĵa oleo uzata en la kuirejo: laŭ la promesoj de la entrepreno tiu nova plantprotektistaĵo "*Bugoil*" efikas kontraŭ akaroj, afidoj (folilaŭsoj), franĝo-flugiluloj kaj aliaj damaĝinsektoj almenaŭ samgrade kiel ĥemiaj rimedoj. La diferenco: ĝi ne postlasas venenajn postrestaĵojn en la nutraĵo kaj ne baziĝas sur la gentefinologio.

Laŭ komunikoj de *Plant Project* la akceptotesto kaj vendopermeso de *Bugoil* en Britio okazos post mallonga tempodaŭro kaj la produktaĵo baldaŭ estos libere je komerca dispono. Antaŭ kelkaj tagoj la japana plantprotekt-konzerno "*Arysta*" akiris la ekskluzivan koncesion por la mondvasta protektado kaj merkataĵo de *Bugoil*. La du firmaoj *Plant Impact* kaj *Arysta* nun kune laboras por la allaso de *Bugoil* en Eŭropa Unio, Usono kaj en pliaj 125 landoj de la mondo. "Tiu ĉi interkonsento certe revolucios la ag-

rokulturan ĥemion“, firme kredas *Peter Blezard*, la ĉefo de *Plant Impact*: la komerca branĉo sin nun pli forte okupos pri la kvalito de la nutraĵplantoj kaj pri la ekologia saneco de la plantoj.

(*Wirtschaftswoche* 27/2009, p. 63)

Kiu enscenigis la unuan puĉon?

La unua puĉo, kiu portis tiun ĉi nomon, estis la t.n. “Zuripuĉo“ (“*Züriputsch*“) je la 6-a de septembro 1839. Ĝin lanĉis reakciaj / klerikalaj rondoj, kiuj antaŭ ĉio celis kontraŭbatali la reformon de la ŝtata eduka sistemo. La radikal-liberala urbokonsilantaro de Zuriko/Svislando nome estis decidinta, dungi “verajn“ elementlernejajn instruistojn kaj ne plu lasi al la pastroj la edukon de la junularo.

Ekde tiu ĉi Zurikpuĉo la vorto “puĉo“ apartenas al la politika pruntvortaro, ĉar okazis tio, kio diferencigas la puĉon de la ŝtatrenverso: potenc-transprenemaj grupoj ekster la registara aparato prenas, per forto, la ŝtatan “direktilon“. Kontraŭ tio, ĉe ŝtatrenverso partoprenas ankaŭ certaj partoj de la registaro. Do, la franca Napoleono faris ŝtatrenversadon – la hispana Franko puĉis. Nu, la puĉistoj de Zuriko jam en la jaro 1845 estis malaperintaj de la politika scenejo – sed la vorto “puĉo“ furoris. Kion fakte signifas puĉo? Ĉar ĝi precize komprenigas gravan politikan okazintaĵon kaj sinsekvon de eventoj, la vorto iĝis transprenita en multajn lingvojn. “*Putsch*“ estas svisa vorto, diversregione uzata kun la signifo de fortega puŝo, kolizio aŭ forta kunpuŝiĝo, krako aŭ knalo.

En Zuriko oni nomas “*Putsch*“ ankaŭ mallongan fortegan pluvovertson. Trans la svisaj landlimoj en aliajn eŭropajn regionojn portis la vorton la fama svisa literaturisto *Gottfried Keller* (1819-1870). En sia romano “La verda Henriko (“*Der grüne Heinrich*“) el la jaroj 1854/55, kiun li verkis en Berlino/Germanujo, la aŭtoro rememorigas pere de la hejmenvenanta titolheroo: “Oni vivis mezloke en vico de sangaj kaj nesangaj epokfaraj turniĝoj, elektomoviĝoj kaj konstituciaj ŝanĝoj, kiujn oni nomis puĉojn.“ “Pruvas ankoraŭ nuntempe la mondovasta lingvouzo, kiom fortan modelkarakteron tiaj okazintaĵoj en Svisujo havis“, atentigas la svisa germanisto *Peter von Matt*. Li tute pravas. Ekzistas – krom “*der Putsch*“ – ankaŭ “*le putsch*“, “*the putsch*“, “*il putsch*“, “*el putsch*“ ...

(2009-09-05/07)

Ortografi-reformo pri planedoj

De post kiam oni forprenis de Plutono la statuson de planedo, ĉiuj teleskopoj direktis sian atenton al la pretiganto de tiaj novaj vojoj: la Centro pri Malgrandaj Planedoj (*Minor Planet Centre*, MPC) en Kambriĝo ĉe Bostono, Masaĉuseco/Usono, kiu respondecas pri la registrado de malgrandaj ĉielaj korpoj en nia sunsistemo. Ĉiuj nanaj planedoj ricevas de MPC sinsekvajn numerojn tuj post kiam estas ekkonata ĝia orbito.

Kvankam la nomo Plutono jam antaŭ 78 jaroj estis donita kaj akceptita, neniam tiu ĉi astro estis ricevinta numeron. La nuna nova numero do devas esti io nekutima, io facile memorigebla, io impresa. Sed la ciferoj 10 000 kaj 100 000 jam estis fordonitaj, kiel ankaŭ ĉiuj samciferaĵoj. Sekve de tio oni proponis la nulon. “Tro negativaj asocioj“ decidis la MPC-ĉefo kaj simple ordonis iun ajn numeron ankoraŭ haveblan. Se proksimatepe oni parolas pri la nana planedo kun la numero “134 340“, vi ja scias pri kio temas – estas Plutono. Ĝi iam estis la naŭa planedo, la plej ekstera de nia sunsistemo.

Ekzistis ankaŭ deka planedo: la astronomo *Mike Brown* de la kalifornia Instituto pri Tehnologio malkovris en 2005 planedon, iom pli grandan ol Plutono, kiu ricevis la provizoran signadon 2003 UB 313. *Brown* nomis la pecegon “*Xena*“ laŭ la heroino de samnoma usona televidserio. La Nacia Aeronautika kaj Spaca Administracio (NASA) listigis la astron *Xena* kiel dekan planedon. Sed tion volis akcepti nek la Internacia Astronomia Unio (IAU) nek MPC, kiu donas sinsekvajn numerojn al nanaj planedoj. Sekve IAU decidis, ke Plutono ne plu estu naŭa planedo kaj *Xena* neniam estu la deka planedo – kaj nun ankaŭ neniam fariĝu la naŭa. Kaj MPC decidis, ke unue okazu la nombrado kaj nur poste la malkovrinto rajtas proponi nomon, kiu ĝenerale estis akceptita.

Por ke *Brown* fine kaj definitive memortenu tion en sia kapo, oni ĉi-foje decidis alie: la numero estis donita – 136 199 – sed la nomo estis malakceptita. Maldeca faro pro la historiaj dimensioj: 136 199 ja estas pli granda ol Plutono – alinome 134 340! Responde al tio, *Brown* ruze nomis sian planedon “*Eris*“ – laŭ la malnovgreka diino de malkonkordo.

(2008-10-28/29)